

# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Majo 2002

ISSN 1163.0442

*\*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem\**

<http://www.sat-esperanto.org/> \*\*\* retadreso: [satesper@noos.fr](mailto:satesper@noos.fr)

73-a jaro, n-ro 5 (1163)

MENSUEL/MONATA

## Unua de Majo 2002



Viktimoj de Haymarket

**POR LA LABORISTAJ RAJTOJ**

Ĉiuj SAT-anoj kaj  
progresemaĵ esperantistoj  
kolektiĝu por diri  
**NE!**  
AL LA FAŜISMO



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

## El la redaktejo...



*Karaj gekamaradoj, vi tenas en la manoj la majan numeron de Sennaciulo kiu aperis post la Unua de majo, la tago de la laboro kaj laboristaro. En ĝi vi povas legi la vokon al la rezisto kontraŭ la grava danĝero por la demokratio kaj libereco. Temas pri revekiĝo de faŝismo kaj ekstrema dekstro, kiel en Aŭstrio, Italio, kaj nun en Francio. Jen do plia pruvo ke la Laborista movado kiel SAT estas nepre necesa, ĉar la «neŭtrala movado» pro sia statuta neŭtraleco devas silenti. Kaj ni ne devas, eĉ ne rajtas silenti. Do, SAT-anoj, kaj aliaj progresemaj esperantistoj, leviĝu kaj montru ke al ni ne estas egale en kia mondo ni vivas; ĉu en la mondo de fraeco kaj egaleco aŭ en la mondo de maltoleremo, rasismo kaj ksenofobio. Esprimiĝu en la paĝoj de nia gazeto, en nia kongreso kaj en la Esperantio ĝenerale. Ni klare diru: NE ! - al la monstro. Kuraĝon al ĉiuj !*

Via

*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

\*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 52€

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

**Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**


## Ĉu vi kandidatis por la nova P.K.

Nun estas la lasta momento por sendi vian kandidatecon por la elekto de la nova Plenum-Komitato de SAT. Per la lasta referendumo vi deziris la ŝanĝon en la SAT-Statuto. Bonvolu do nun apliki tiun ĉi novan paragrafon kaj aktivi en la nova tutmonda Plenum-Komitato. La kandidatiĝoj devas atingi la sidejon antaŭ la 15-a de majo. Krom mallongan biografieton bonvolu sendi ankaŭ vian foton.

La listo de kandidatoj aperos en junia numero de Sennaciulo. La novaj kandidatoj estos prezentataj al la kongreso en Alicante kaj la jarfina referendumo findecidos.

Ankaŭ ne forgesu kandidatiĝi por la Ĝenerala Konsilantaro laŭ horzonoj. La kandidatecojn kolektas sekretario de Ĝ.K., k-do Jakvo Schram.

La aktuala Plenum-Komitato de SAT



UNIVERSITATO DE ALICANTE -  
NIA KONGRESLOKO VIDATA EL AVIADILLO  
SAT-KONGRESO KAJ LA URBO ALICANTE ATENDAS VIN !

### ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# LA UNUA DE MAJO

## ĈE L'KORO DE LA ALTERNATIVA TUTMONDIĜO


La oficiala historio de la unua de majo datiĝas de 1884, kiam la sindikatoj de Usono kaj Kanado elektis, kiel komencan tagon de ilia ĝenerala striko favore al la okhora labortago, la unuan de majo 1886. En Ĉikago, iom post tiu dato kaj la eko de la striko, la kvaran de majo 1886, policista provoko okazis dum manifestacio sur placo Haymarket. Bombo estis lanĉita de provokisto. Kvar anarkiistoj estis arestitaj sekve de tiu evento kaj, poste, pendumitaj.

En Francio, tiu momento de la komenco de majo, datreveno de l'faligo de la Pariza Komunumo kaj de la amasbuĉoj kiuj sekvis, estis tradicie skuita de la laborista movado, kiu poiome revigliĝis: « La tempo-n de la ĉerizoj » (dediĉita de ĝia aŭtoro al iu flegistino de la Komunumo), oni kantis, omaĝe al la mortpafitoj. Oni ŝuldas la internaciigon de la unua de majo al Raymond Lavigne, demokrat-socialista aktivanto, kiu, dum la fondiĝkongreso en Parizo de la Dua Internacio, en julio 1889, tri jarojn post Haymarket, akceptigis ke la unua de majo fariĝu internacia tago de agado favore al la okhora labortago.

Iom poste, tiu dato estis stampita de grava evento: la unuan de majo 1891, en urbo Fourmies (norda Francio), okaze de laborista manifestacio, la militistoj mortpafis naŭ homojn el kiuj ok estis malpli ol dudekjaraĝaj kaj unu infano dekjaraĝa. Tiu evento

estigis grandan emocion en la tuta lando. Paul Lafargue, bofilo de Marx kaj fama aŭtoro de la « Rajto pri la

kado de hejtforno, kiu permesis al li fariĝi industriisto. Godin estis disĉiplo de Fourier, la bone konata socia-



*Informo pri masakro de Fourmies, en la franca revuo «L'Illustration»*

pigreco », kiu protestis tiukaze, estis enkarcerigita pro « instigado al murdo », laŭdire.

Sed alia origino de la unua de majo ekzistas, malpli konata kaj iom pli malnova. La franco Jean-Baptiste Godin (1817-1888) estas la iniciatoro de tiu tradicio.

Tiu homo, komence eta manlaboristo, riĉiĝis dank'al patento pri la fabri-

listo, laŭdire « utopia », patro, kun Owen, de la komunujismo. Li havis la « sanktan fajron »: anstataŭ uzi sian riĉecon al personaj celoj, tiu stranga « nova riĉulo » utiligis ĝin cele al sia idealo, entreprenante, dum la Dua Imperio, la realigon de komunejo laŭ la projekto, ĝis tiam nenie realigita, de sia forpasinta majstro. Tiel, en urbo Guise situata en norda Francio, ape-

naŭ tridek kilometrojn for de Fourmies, anekse de sia hejtilfabriko, la estro Godin konstruis falansteron (falangejon) por siaj laboristoj.

Tiu domaro, la Familistère, kiun mi jam vizitis (ankoraŭ nuntempe oni povas viziti ĝin) estas mirinda. Ekde la 1860aj jaroj, dum la laboristoj estis terure, senkompate ekspluatataj kaj ĉie loĝis en domaĉoj, la loĝantoj de tiu tute originala komunejo, profitis de modernaj kolektivaj ekipaĵoj: teatro, kooperadaj vendejoj, hejtigita banejo, infanejo. Alia fakto donas al ni bonan ideon pri la moderneco de tiu komunumo: en la lernejo de l'Familistère, la lernigado, deviga ĝis la dekkvarjariĝo, estis jam gea; ĉie aliloke en la mondo, la tiamaj lernantoj estis apartigitaj laŭ la sekso, kiam ili havis la bonŝancon vizitadi la lernejojn (nur en 1882, proksimume dudek jarojn poste, la lernigado fariĝos deviga en Francio). Krome, la dungitoj de Godin estis interesataj en la profito de la entrepreno.

Do, en tiu loko, la unuan dimanĉon de majo 1867, kvar jarojn antaŭ la Pariza Komunumo, granda festo de la laboro okazis kun la loka fanfaro (fakte, konforme al la originaj deziroj de Fourier, multaj festoj okazadis en la Familistère). Ekde tiu dato, la unua dimanĉo de majo emblemiĝis kiel festo de la laboro en tiu komunumo.

\*Oni povas do tion konstati: la origino de la unua de majo estas unuflanke ĉiatendenca (anarkiisma, soci-demokrata, komunujisma) kaj, aliflanke, multnacia (usona, kanada, franca). Kontraŭ, la oficiala tutmondiĝo, hegemonia, kiu tretas la liberecojn, la popolojn, eĉ la vivojn, ni bone scias ke

*Fino, paĝo 68*